

Jan Kornel, unu el nekonataj batalantoj de tridekjara milito

Oldřich Arnošt Fischer

Prelego por Esperantista Klubo Brno, la 9-an de februaro 2021



*Vtom uzřím, an ted' z bojoviřtř nejedny
s odřtřpenřma rukama, nohama,
hlavou, noseř;
se zvrťanřm třřem, sřřapenou křřř;
vře krvř zohavenř, vedou a nesou;
na nřř kdřř lřtostř sotvř
hledřti mohu,
tlumoĉnik mi dř: „Vřeĉko se to zhořř,
soldřt musř otrlř břti.“
„A co pak,“ dřm jř, „kteřř tam krkř nechali?“
Odpovřdřř: „Jřř ta křřze zaplacenř byla.“*

Tuj mi ekvidas, ke nun el la batalkampo oni gvidas
kaj portas plurajn senbrakulojn, senkrurulojn,
kun vunditaj kapoj, nazoj,
traboritaj korpoj, diřřiritaj hařtojn;
persange ĉiuj estas tiel aĉe malpurigitaj,
ke kařze de kompato mi ilin apenař
kapablas rigardi,
mia interpretisto al mi diras: „Ĉio tio resaniĝos,
la soldato devas esti cinika.“
„Sed kiun sorton,“ mi diras, „havis la falintojn?“
Li respondis: „Anticipe oni pagis iliajn hařtojn.“

Jan Āmos Komenskř (1592 – 1670): Labirinto de la Mondo kaj Paradizo de la Koro, 1623

En la jaro 1974 mi ricevis nove eldonitan libron kun longa nomo: **Mirindaj travivařoj kaj aventuroj de Jan Kornel, kiujn li travivis sur tero kaj maro, inter soldatoj, galeruloj, piratoj, indianoj, homoj bonaj kaj malbonaj, ĉiam estante fidela al sia koro** (ĉeĥe: *Podivuhodnř přřběhy a dobrodruřstvř Jana Kornela, jak je zařil na souři i na moři, mezi soldřty, galejnřky, pirřty, Indiřny, lidmi dobrřmi i řpatnřmi, sřm vřdy vřren svřmu srdci*).

La libron, kiu estis verkita kiel rakonto de fikcia partoprenanto de la tridekjara milito, mi jam multfoje tralegis, ĉar vere ĝi estas mirinda.

La aŭtoro estis **Miloř Vřclav Kratoĉvřl** (1904 – 1988), ĉeĥa verkisto, aŭtoro de historia beletrio, filma scenaristo, dramaturgo kaj pedagogo. Li naskiĝis en Vieno la 6-an de januaro 1904. Lia patro estis korta arĥivisto. Juna M. V. Kratoĉvřl studis en Prago en mezlernejo, poste en la Filozofia Fakultado de la Karola Universitato historion kaj arĥivadon. En la jaro 1928 li doktoriĝis kaj eklaboris en Arĥivo de ĉefurbo Prago. En la jaro 1944, kiam germanaj okupantoj la arĥivon fermis, li mallonge laboris en la firmao Nationalfilm. En la jaroj 1945 – 1947 li laboris en Ministerio de Informoj. En la jaroj 1947 – 1950 li estis filma dramaturgo kaj en la jaroj 1950 – 1972 profesoro en Filma Akademio de Muzaj Artoj.

Li helpis al reĝisoro **Otakar Vřvra** (1911 – 2011) krei filmojn pri nia historio (ekz. „Jan Hus“, „Jan Źiřka“), verkis historiajn romanojn.

Eĉ kiel pensiulo Kratoĉvřl okupiĝis pri politiko, bedaŭrinde li helpis al maldekstra flanko. En la jaro 1977 en socialisma Ĉeĥoslovakio ekestis neformala civitana inicito

kaj grupiĝo de politika opozicio, kiu atentigis, ke socialisma registaro ne observas humanajn rajtojn, kiujn ĝi promesis observi. Inter aŭtoroj de la dokumento Ĉarto 77 estis **Václav Havel** (1936 – 2011), **Pavel Kohout** (*1928) kaj **Jan Patočka** (1907 – 1977). Komunistoj subskribantojn de la Ĉarto 77 persekutis. Ĉartanoj estis ofte maldungitaj, venĝo de komunistoj celis ankaŭ kontraŭ familianoj de la ĉartanoj. En la ĵurnalo Ruĝa Rajto (*Rudé právo*) komunistoj publikis la artikolon „Kraŝuloj kaj Meminvitiĝuloj“ („*Ztroskotanci a samozvanci*“), en kiu ili atakis ĉartanojn. En socialisma humorista ĵurnalo Histriko (*Dikobraz*) komunistoj la ĉartanojn publike mokis. Filozofo Jan Patočka, la ĉartano, fariĝis unu el la unuaj viktimoj de malliberejo kaj kruelaj aŭskultadoj.

Ĉeĥoslovakaj komunistoj ricevadis instrukciojn de soveta komunistoj. En soveta instrukcio „Kiel Manipuli kun Indiĝenoj“ estis la konsilo: „Diskreditigu la personecojn, kiuj estas inter la indiĝenoj popularaj“. Ĉeĥoslovakaj komunistoj eldonis la dokumenton „En la Nomo de Socialismo kaj Paco Por Novaj Kreantaj Agoj“ („*Za nové tvůrčí činy ve jménu socialismu a míru*“) kaj devigis famajn elstarulojn de kulturo tiun dokumenton (koncize nomatan „Kontraŭĉarto“) subskribi. Tio okazis la 28-an de januaro 1977 en nia ĉefurbo en Nacia Teatro (la dokumenton tralegis aktorino **Jiřina Švorcová** (1928 – 2011) kaj la 4-an de februaro 1977 en Teatro de Muziko (la dokumenton tralegis kantisto **Karel Gott** (1939 – 2019)). Publiko estis konsternita. Multaj partoprenantoj de teatraj renkontiĝoj la Ĉarton 77 neniam tralegis, sed ili vole-nevole subskribis la Kontraŭĉarton, ĉar ili instinktive sentis, ke se ili ne subskribus, ili ne plu havus laboron. Miloš Václav Kratochvíl, tiam 73-jara, verŝajne ne estis devigita, ĉar li estis inter la unuaj subskribantoj de la „Kontraŭĉarto“. Fian dokumenton subskribis ĉirkaŭ 7 500 elstaruloj de kulturo, tiel granda estis timo de la reĝimo en nia tiam socio. Miloš Václav Kratochvíl forpasis la 9-an de julio 1988 en Prago.

Lia libro pri aventuroj de Jan Kornel estis verkita en la jaro 1974. La tekston bele ilustris **Milada Marešová** (1901 – 1987), kiu komunistiĝis en la jaro 1945, sed en la jaro 1969 ŝi la komunisman partion forlasis, ĉar ŝi ne konsentis kun soveta okupado de Ĉeĥoslovakio (1968 – 1991).

Kaj kiu estis Jan Kornel? Ĉeĥa knabo, kiu naskiĝis en bohemia vilaĝo Mlčechvosty en la jaro 1626, kiam en Bohemio furiozis tridekjara milito.

Ĉu la tridekjara milito temis pri kredo kaj religio? Tio estis klara, kiam la milito disvastiĝis en Eŭropo: kun katolika habsburga imperiestro faris koalicion nekatolikaj saksonoj kaj katolikaj francoj kontraŭ ili batalis kun helpo de nekatolikaj svedoj. En ĉiuj armeoj batalis soldatoj de diversaj naciecoj.

La 23-an de majo 1618 en Prago estis trafenestritaj tri oficistoj de habsburga imperiestro kaj tiel fakte komenciĝis la milito de nekatolikaj nobeloj kun katolikaj Habsburgoj.

Kiam Jan Kornel estis juna viro, li estis trompita, same kiel kelkaj aliaj knaboj el lia vilaĝo. Anstataŭ laboro atendis lin varbado en imperiestran armeon. Nevole li fariĝis imperiestra muŝketisto. La varbisto, unuokula leŭtenanto, nur demandis: „Kiel vi nomiĝas? El kiu vilaĝo vi devenas?“ Ŝokita Jan elbalbutis sian respondon, skribisto ĝin dokumentis, la varbisto ĵetis al li sur la tablon unu florinon kaj jam varbis sekvantan viron. Unu florino – lia haŭto (vivo) estis pagita, kiel skribis Komenský en Labirinto de la Mondo kaj Paradizo de la Koro (1623).

La muŝketistoj estis la soldatoj, kiuj pafis uzante muŝketojn. La muŝketo estis la pafilo, kiu pezis eĉ 10 kilogramojn. Tial la muŝketistoj portis ankaŭ forkegojn, per kiuj antaŭ pafado siajn muŝketojn ŝtrebis. En lignaj kartoĉoj la muŝketisto portis pulvon. Se la kuglo pezis 40 g, en la patrono devis esti ĉirkaŭ 38 g da pulvo. Ĉiu kartoĉo enhavis unu dozon da pulvo, kiu estis necesa por unu pafado. La muŝketisto ŝarĝis sian muŝketon per polvo

kaj kuglo. La pulvo estis bruligita per brulŝnuro. Antaŭ ĉiu pafado la muŝketisto devis fari ĉe centon da diversaj agoj. La kuglo flugis ĉirkaŭ 1 200 m. Efika pafdistanco estis 220 m. Se celo troviĝis nur en la distanco centoj da metroj, la kuglo ankoraŭ kapablis trapenetri kirason.

Dum ŝargado de la muŝketoj la muŝketistoj estis protektitaj per vivanta bariero de pikŝtangistoj. Ankaŭ la pikŝtangistoj estis speciale trejnitaj soldatoj. La trejnita pikŝtangisto kun sia longa pikŝtango sciis krei 60 diversajn kaptomanierojn.

Bonŝance Jan en armeo trovis amikojn. Kun li estis samvilaĝanoj Štěpán Karták kaj Václav Motejl. Maljuna muŝketisto Matouš Pětioký zorgis pri novaj soldatoj kaj rakontis al ili pri sia partopreno en la batalo apud Blanka Monto (la 8-an de novembro 1620). Konsiloj de Pětioký estis tre utilaj. Bona amiko estis ankaŭ regimenta skribisto Kryštofek, kiu estis edukita, sentema kaj afabla.

Sed danĝera malamiko estis leŭtenanto Tajfl (Diablo, el germana vorto *Teufel*). Li trompis soldatojn. Oficiroj ofte antaŭ bataloj pagis al la soldatoj nur duonon da salajro. Multe da soldatoj en la bataloj falis kaj iliaj salajroj restis al la oficiroj. Dum la milito tiel profitis multe da oficiroj. (Plej multe **Albrecht el Valenštajn** (1583 – 1634), kiu devenis el nekatolika familio, sed katolikiĝis, danke al senskrupula konduto dum la milito riĉiĝis, kaj antaŭ fino de vivo li eĉ volis kun helpo de nekatolikaj (!) svedoj fariĝi bohemia reĝo.)

Kiam imperiestra regimento vintre loĝis en bohemia urbo Soběslav, Tajfl al soldatoj mensogis, ke li ricevis neniun monon por salajroj. Li eĉ al ili montris du malplenajn kestojn. Sed Jan Kornel ekrimarkis, ke Tajfl al soldatoj dufoje montris nur unu el du kestoj, kiu estis malplena. La alian, plenan keston, Tajfl al soldatoj ne montris kaj kaŝis ĝin por si mem.

Jan Kornel tion vespere diris al siaj amikoj. Matene li kun Štěpán Karták iris al Tajfl. Ili volis Tajflon timigi, diri al li, ke ili scias pri lia trompo. Sed Tajfl estis sperta fiulo. Li ambaŭ soldatojn malliberigis kaj akuzis de ribelio. Jan kaj Štěpán atendis ekzekuton.

Sub pendigilo en lasta momento ilin savis regimentestro kolonelo Pompejo. Tiu oficiro, italo, estis strikta, sed li ne ŝatis kruelecon. Li diris, ke la ribelio estas peko, kiu devas esti punita, sed la soldatoj estas tre junaj. Tial li volis ekzekutigi nur unu el la soldatoj. Kiun? Tion decidis ludo, ĵeto de kubo. Jan Kornel venkis, sed ne ĝojiĝis, ĉar li sciis, ke lia amiko estos pendita. En lasta momento aperis armeaj skoltoj, kiuj ekkriis, ke proksimiĝas iu malamiko. Tajfl volis Karták-on pendigi, sed Pompejo tion ne permesis. Laŭ li ĉiu soldato povis esti utila en batalo. La alarmo estis falsa. Ĝi temis nur pri kelkaj svedaj skoltoj, ne pri tuta sveda armeo.

Sed printempe svedoj vere aperis. Sveda generalo **Lennart Torstenson** (1603 – 1651) havis grandajn ambiciojn. Li volis kun helpo de armeo de transilvania princo **György Rákócsi la 1-a** (1593 – 1648) konkeri Vienon. Imperiestra armeo kun helpo de bavaroj volis en Bohemio svedan atakon haltigi. La 6-an de marto 1645 Jan Kornel, imperiestra soldato, partoprenis en batalo apud Jankov, kiu estis unu el la plej kruelaj bataloj sur nia teritorio. Imperiestra militestro **Melchior Hatzfeld, la grafo el Gleichen** (1593 – 1658), gvidis sian armeon tra valo, kie ĝi suferis de sveda pafado, ĉar svedaj artileristoj pafis de sur ĉirkaŭaj montetoj. Li opiniis, ke maldekstra flanko de lia armeo estas sufiĉe bone protektita per fiŝlagoj. Li tien ne sendis siajn skoltojn, nur li havis sian opinion, ke marte sur akvonivelo jam ne estas glaco. Sveda generalo Torstenson siajn skoltojn al la fiŝlagoj sendis. Tial li eksciis, ke glaco sur la fiŝlagoj estas sufiĉe dika, eĉ por svedaj ĉevalrajdistoj. Svedoj transiris la fiŝlagojn sur la glaco kaj atakis Hatzfeldon el la maldekstra flanko. Marŝalo **Johann von Götzen** (1599 – 1645) sendis siajn ĉevalrajdistojn en densan arbaron, kie ili estis venkitaj de svedoj. Kaj bavaroj ĉevalrajdistoj hazarde trovis svedan arieron. En tiu momento ili ĉesis batali kaj ekrabis. Ili ŝtelis svedan monon, ĉaron de Torstenson (en kiu estis lia edzino)

kaj alkoholon. Svedoj, kiu ankoraŭ ne ĉesis batali, ilin facile venkis. Rezulto de la batalo: 6 500 mortaj soldatoj, inter ili von Götzen; la militestro Hatzfeld estis malliberigita. Post la batalo apud Jankov Torstenson havis liberan vojon al Vieno, sed lia transilvania aliancano ne alvenis, tial Torstenson preferis konkeri anstataŭ Vieno moravian urbon Brno (nesukcese).

Jan Kornel en la batalo estis vundita, li perdis orelon. Grupo de vunditaj soldatoj haltigis la ĉaron, en kiu estis nur unu oficiro, leŭtenanto Tajfl. Li neniam batalis, nur ŝtelis kaj profitis de la milito. La soldatoj volis esti transportitaj en pli sekura loko, sed Tajfl tion ne volis permesi. Lia ĉaro estis plena de varo kaj mono, kiun li ŝtelis. Jan Kornel havis ŝancon Tajflon mortigi, sed li ne volis tion fari. Soldatoj Tajflon elrabis. Vespere Jan Kornel, Matouš Pětioký, Václav Motejl kaj Kryštůfek devis dizerti, ĉar Tajfl revenis en tendaron kaj volis venĝi.

Ili vagis en Bohemio, Aŭstrio kaj Germanio. Tie ili estis kaptita per ribelantaj germanaj kamparanoj. La kamparanoj malamis ĉiujn soldatojn, ĉar la soldatoj de ĉiuj armeoj ŝtelis kaj rabis. En danĝera situacio helpis Pětioký, kiu bone sciis germanan lingvon. La kamparanoj eksciis, ke la ĉeĥaj dizertintoj estis ankaŭ vilaĝanoj, kaj amikiĝis kun ili. Ilia estro ne ĉeestis kaj la kamparanoj pri ili rakontis, ke lia nomo estas stranga, ke oni ĝin ne kapablas prononci, sed li estas bona husano. Eĉ germanaj kamparanoj sciis, kiu estis ĉeĥa reformisto de romkatolika eklezio Jan Hus (?1371 – 1415) kaj la husanoj. Estro de la kamparanoj estis ĉeĥo, Šimon Zejtrodomů, la dizertisto, kiu devenis el Klapé sub Házmburk, najbara vilaĝo de naska vilaĝo de Pětioký. Tial kvar ĉeĥaj dizertintoj helpis al la germanaj kamparanoj. Sed la kamparanoj estis venkitaj per saksona regimento. La dizertintoj denove fariĝis soldatoj – en saksona regimento. Tie ili eksciis, ke en la 24-an de oktobro 1648 la tridekjara milito finiĝis. Terura milito solvis neniun problemon de la socio. Jan Kornel en la urbo Osnabrück renkontiĝis kun **Jan Ámos Komenský** (1592 – 1670). Matouš Pětioký edziĝis kun germana gastejstrino.

Sed Jan Kornel tie renkontiĝis kun sia malamiko. Leŭtenanto Tajfl lin rekonis kaj lia venĝo estis kruela. Jan estis malliberigita. Kryštůfek volis al sia amiko helpi, sed ankaŭ li fariĝis viktimo de Tajfl. Jan kaj Kryštůfek estis venditaj al hispana galero.

Ili estis longtempe transportitaj en Hispanion. En la galero ili estis binditaj al seĝoj, ofte batitaj. Bonŝance ilia najbaro estas franca galerulo Jacques, kiu sciis germanan, araban, kaj havis multe da spertoj. Vivo sur la galero estis plena de sufero.

La galero estis atakita per piratoj. Ĝi alfundiĝis. Jacques sukcesis proprigi al si ŝlosilojn de katenoj kaj liberigi sin mem ka siajn najbarojn. Jan sciis bone naĝi, tial li savis ankaŭ unu el nigruloj, kiu nomiĝis Selim. Jacques, Kryštůfek, Jan Kornel kaj Selim savis siajn vivojn kaj sur ligna tavolo el la galero povis flosveturi, sed al ili mankis manĝaĵo kaj trinkebla akvo. Bonŝance ilin savis maristoj de hispana ŝipo.

Kapitano de la ŝipo aspektis kiel bonkorulo, sed post albordiĝo en Santo Domingo, ĉefurbo de la insulo Hispaniola (nuntempa Haitio), li ĉiujn kvar amikojn vendis al franca plantejposedanto.

Jacques al li diris, ke li ankaŭ estas franco, sed la plantejposedanto lin batis kriante, ke en tiu situacio estas neniuj samlandanaj rilatoj, nur la rilato „mastro – sklavo“. Kvar amikoj devis en praarbaro krei novan kampon kaj tie planti tabakon. Ili ricevis precipe nur plantan nutraĵon. Laboro en tropaj kondiĉoj estis malfacila. Kryštůfek baldaŭ malsaniĝis kaj suferis de malario.

Sed liberiĝo estis neatendita. Ebria plantejstro batis Janon kaj eĉ pikis lin per sia ponardo, sed en tiu momento Jacques lin kaptis, bindis al arbo kaj poste kruele batis. Li venĝis pro la plantejposedanta „samlandana“ bonveno.

Kompreneble kvar amikoj poste devis rapide fuĝi. Ili trovis bukenerojn, ĉasistojn, kiuj ĉasis sovaĝajn porkojn kaj fumis ilian viandon. Kryštůfek baldaŭ forpasis. Jacques, Selim kaj Jan helpis al la bukaneroj. Sed Jan vundis per tranĉilo sian brakon. La vundo infektiĝis. Tial la bukaneroj lian brakon amputis. Unusola narkozo estis alkoholo. Jan la amputon de brako transvivis.

Post iu tempo Jacques, Selim kaj Jan trovis piratan ŝiparon de fama franca pirato **François l'Olonnois** (1630? – 1669). Ili ekservis en la ŝipo, kies komandanto estis franca nobelo Luis du Puis. Komence la vivo inter la piratoj („batalantoj de liberaj maroj“) al Jan plaĉis, ĉar post longa tempo li estis libera homo. Sed kiam la piratoj atakis kaj konkeris la urbon Maracaibo en nordokcidenta Venezuelo, li vidis multe da kruelaj agoj, kiujn faris la piratoj.

Dum divido de rabaĵo li senintence vundiĝis. Li trapafis sian kruron. Pro tio li de la piratoj ricevis financon kompenson. Li volis reveni hejmen, en Bohemion.

Li liberigis ankaŭ sklavon Selimon. Ambaŭ amikoj kune veturis en Eŭropon. Selim revenis en Turkion, Jan post dudek jaroj revenis en Bohemion. Liaj gepatroj jam ne vivis. La vilaĝo Mlčechvosty estis damaĝita de la milito. Jan edziĝis kaj fariĝis gardisto de vinberejoj. En libera tempo li verkis siajn rememorojn.

Laŭ mi tiu bela rakonto havas unu ombron. Jan Kornel estis mezepoka homo el la 17-a jarcento. Tiamaj homoj estis piaj. Sed en rakonto de Jan Kornel ne estas eĉ rememoro pri diservoj, Jan neniam preĝis. Li eĉ en la plej danĝeraj situacioj ne pensis pri Dio. En la libro eklezioj estas priskribitaj aŭ neŭtrala aŭ negative. Aŭtoro de la libro bonege sciis historion, sed li ne sukcesis pensi kiel homo de la 17-a jarcento, tial Jan Kornel aspektas kiel ateisto.

Kritikistoj ofte atentigas, ke fikcia heroo Jan Kornel travivis kaj transvivis tro multe da aventuroj. Jes, sed kiom da viroj, kies nomojn ni jam neniam povas trovi, dum la tridekjara milito travivis similajn aventurojn!

La libro pri Jan Kornel apartenas al miaj tre ŝataj libroj kaj estus bone, se ĝi iam estus esperantigita.

Rekomendita literaturo

- FISCHER, O. A. 2011: Karolo la pli Aĝa de Žerotín. Prelego por Esperantista Klubo Brno, filia societo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, la 2-an de novembro 2011. – <http://esperantobrna.cz/malnova/fischer-zerotin.pdf>.
- FISCHER, O. A. 2018: Biblio de Kralice. Prelego por Esperantista Klubo Brno, filia societo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, la 20-an de julio 2018. – <http://esperantobrna.cz/malnova/fischer-Biblio.pdf>.
- FISCHER, O. A. 2020: Kiel okazis la kazo de Maria Kolono. Prelego por Esperantista Klubo Brno, filia societo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, la 11-an de marto 2020. – http://esperantobrna.cz/malnova/fischer-maria_kolono.pdf.
- HORA-HOŘEJŠ, P. 1994: Toulky českou minulostí, la 3-a volumo. 1-a eld., Prago, Baronet, 239 paĝoj.
- HORA-HOŘEJŠ, P. 1995: Toulky českou minulostí, la 4-a volumo. 1-a eld., Prago, Baronet, 239 paĝoj.
- KOMENSKÝ, J. A. 1978: Labyrint světa a ráj srdce, paĝoj 271-412. In: KOPECKÝ, M. k. a. (Ed-oj): Dílo Jana Ámose Komenského, 3-a volumo, 1-a eld., Prago, Academia, 633 paĝoj.
- KOMENSKÝ, J. A. 1978: Kšaft umírající matky, jednoty bratrské, paĝoj 595-604. In: KOPECKÝ, M. k. a. (Ed-oj): Dílo Jana Ámose Komenského, 3-a volumo, 1-a eld., Prago, Academia, 633 paĝoj.
- KRATOCHVÍL, M. V. 1974: Podivuhodné příběhy a dobrodružství Jana Kornela, jak je zažil na souši i na moři, mezi soldáty, galejníky, piráty, Indiány, lidmi dobrými i špatnými, sám vždy věren svému srdci. 8-a eld., Praha, Albatros, 256 paĝoj.